

# 6

# KARPENO

*Carpinus Betulus*

 2017

La ŝlosila demando estas: ‘Ĉu la originala heĝo de Hago estis fago-heĝo aŭ karpeno-heĝo?’ (En la nederlanda similas la du vortoj.) La respondo estas, ke originale tute ne temis pri heĝo, sed pri arbaro – kaj ke, malgraŭ tio, ke la folioj de la fago kaj de la karpeno sufiĉe similas, ili tute ne estas la sama arbo. La fago-folio havas ‘harojn’ kaj tiu de la karpeno, ‘dentojn’.

La karpeno estas multe pli bone pritondebla kaj formebla en belaj avenuoj ol la fago. Ĝi portas inajn florojn kaj ankaŭ virajn katenflorojn. Ĝia karakteriza frukto estas bongustaĵo por diversaj musoj, fringoj kaj sito.

Sed ĝia plej granda ĝuanto estas la majskarabo-masklo, kiu frandas la foliojn: ĝi ebriiĝas de la alkoholo, kiun la atakitaj folioj sekrecias, kaj ebriiĝinte la majskarabo senĝene serĉas inon. Ne tute certas, ĉu la majskarabaj sinjorinoj bonvenigas ĉi tion... La karpena ligno ne fendiĝas, sekve ĝi estas uzata por fabriki hakblokojn, palisojn, olemuelejajn mekanismojn kaj eĉ pianajn klavojn.

[www.josvertelt.nl](http://www.josvertelt.nl)



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

